

# Antaŭparolo

## -- Pri ŝunjato --

Ikeda Hiroŝi

Antaŭ ĉirkaŭ dudek kvin jarcentoj, La Budho Ŝakamunio atingis la veran saĝon, per kiu Li povis savi ĉiujn homojn el la suferado en homa vivo. De tiam Li predikadis la doktrinon Budhismon, dum Sia tuta vivo, al Siaj disĉiploj, kiuj estis gesamgoj kaj gelaikoj. Li gvidis la disĉiplojn, montrante la plej taŭgan predikon, laŭ iliaj statoj, komprenpovoj, kaj kapabloj. Li montris malfacilan problemon al saĝulo, sed tre simplan al malsaĝulo. Tiamaniere Li elgvidis ĉiujn disĉiplojn en la plej altan iluminiĝon.

Gesamgoj, forlasinte ĉiujn siajn havaĵojn, profesion, kaj eĉ familianojn plejamatajn, tutkore klerigadis sin en la budhismo. Ili celis elliberigi sin en la plej alta religia saĝo kaj atingi la staton de la sanktulo Arhato, kiu estas jam sinliberiginta el la vulgaraĵoj kaj el la amo (ne nur amoro, sed ankaŭ vulgara amo al siaj familianoj kaj amikoj), kaj ĉiam trankvila kaj racia. Por tio ili altigadis sin stoike kaj askete laŭ la moralordonoj de la budhismo, kaj ĵetis sin en la meditaton. Tiu ĉi rimedo estas perfektigita kiel hinajano (malgrandveturila budhismo), kaj prosperas vigle en la suda kaj la sud-orienta Azio.

Tamen, por la gelaikoj tia rimedo estis neebla, ĉar ili havis respondece multajn katenojn pro siaj familianoj kaj pro sia socio. La Budho predikis por la gelaikoj tiajn rimedon de sindonado, per kiu oni povas atingi en la Veran Saĝon de la budhismo.

Tiu ĉi predikaro estis heredita de laikaj kredantoj, kaj poste perfektigita kiel la mahajano (grandveturila budhismo), kaj kredata en la orienta Azio.

Antaŭe oni diris, ke la mahajano estis farita ne de La Budho mem, sed de la Liaj heredintoj. Estas vere, ke la sutroj de la mahajano aperis kelkajn jarcentojn pli poste ol la hinajanaj. Tamen, estas multe da duboj kontraŭ tiu konkludo. Nuntempe, kelkaj studantoj opinias, ke la mahajano ekzistis paralele kun la hinajano, eĉ en la epoko de La Budho, kvankam ĝi estis ankoraŭ ne perfekta.

Tamen, tio ne gravas, ĉar la diferenco inter la hinajano kaj la mahajano estas la diferenco de vojoj, kiuj kondukas nin al la sama montosupro, La

Versaĝo. Sen diligenteco oni neniam povus atingi la versaĝon, eĉ se oni suprenirus laŭ ia ajn bona vojo.

"Ŝunjato" estas unu el la plej gravaj ideoj en la budhismo, precipe en la mahajano. Tiu ĉi Praĵnjaparamita-hrjdaja sutro estas la esenco de konsideraro pri la ŝunjato. La ideo de la ŝunjato estas klarigita en diversaj praĵnjaparamitaj sutroj. Plej detale ĝi estas klarigita en la 600 volumoj de "Mahapraĵnja-paramita sutro". Sed la tuta signifo de la ŝunjato estas kondensita en tiu ĉi tre mallonga Hrjdaja-sutro.

Do, kio estas la ŝunjato? Estas tre malfacile envortigi ties signifon; eĉ se iu ajn, kiu bone komprenas la tutan ideon, predikadus ĉiutage dum unu jaro, li ne povus komprenigi ĝin pervorte. Sed se vi meditos pri la ideo de ŝunjato, leginte tiun ĉi sutron nepre vin envenos ia iluminiĝo.

Iom ĝenas min, ke eble vi pensos jene. "Vere, la sutro estas tre mallonga, sed tro malfacila." Jen, por helpi vian komprenon, mi montras kelkajn sugestojn. Sed vi memoru ke veran komprenon vi devas preni vi mem, kaj pro tio ĝi fariĝas vera!

Origine, ŝunjato estas la NULO en hinda matematiko, kaj signifas, "Ne ekzistas io."

En la filozofio budhisma, oni vidas ĉiun enton ne kiel ekzistaĵon, sed kiel staton aŭ kiel fenomenon. Laŭ tiu ĉi vidpunkto, nenio ekzistas en la mondo, sed nur okazas fenomenoj.

Tamen oni povas kompreni la nulon, samtempe, kiel la sumon de ĉiuj numeroj, aŭ kiel la ekvilibron de ĉiuj fortoj. Laŭ tiu ĉi kompreno, nulo enhavas ĉion kaj estas ĉiam trankvila, la stato nirvana.

En la hinajano, oni malaperigas sian ĉian deziron por atingi nirvanon. Sed, en la mahajano, oni konstatas ĉian deziron kiel nature puran, kaj trovas en ĝi nirvanon. Alivorte, hinajana nirvano estas punkta nulo, kaj mahajana nirvano estas ekvilibra nulo.

En Zenismo, oni esprimas ĝin jene, "Starante sur la pinto de stango cent futojn alta, ekpaŝu plu! jen estas la ŝunjato."

Ĉu vi falos teren? Ne, se vi jam komprenas la ideon de la ŝunjato, vi neniel falos teren, eĉ se vi efektive praktikos ĝin. Bedaŭrinde mi ne havas rajton klarigi kial, ĉar ĝi estas temo de prikonsidero en Zenismo, kaj klarigenda de gvidsamgo je ĝuste taŭga tempo laŭ via progreso. Mi povas

nur diri ke ĝi implicas tute elliberiĝintan koron. Se vi volas kompreni pli profunde, vizitu zentemplon.

Certe vi ricevos afablan gvidon.

Mia kompreno naturscienca, kiu estas ne nur mia, sed nuntempe klarigata simile de kelkaj sciencistoj, estas jena:

Ĉiu ekzistaĵo en nia mondo estas konstruita el elementaj korpuskloj, kiuj estas unu formo de energio. Pro tio ĉiaj ekzistaĵoj estas egalaj al si reciproke, plie tute egalaj al ĉiu fenomeno senforma. Ĉar la energio povas havi ĉian formon ekz. luman, sonan, elektran, kemian, termikan k.t.p. Tiel, ni povas kompreni ĉian ekzistaĵon, ĉian fenomenon, eĉ nian senton, percepton, intencon aŭ scion, kiel unu formon de energio.

Kiamaniere ni povas konstati objektojn? Unue, la objekto ŝanĝas la proporciojn de la ondlongecoj en la reflektata lumo. La lumo eniras en niajn okulojn kaj tie ŝanĝiĝas en kemian energion. Poste, tra la nervo, ĝi estas multfoje transformata en aliajn energi-formojn, kaj fine, en la cerbo, analizite, distingite, identigite, la koloro kaj la formo de la objekto estas konstatataj. Sammaniere ni povas konstati sonon, odoron, guston kaj tuŝon. Intenco kaj volo, objektoj de koro, ankaŭ same okazas pro la komputileca kalkulado en la cerbo.

Tial, ni atingas la konkludon ke ĉio estas energia fenomeno. Kaj ĉar la energio estas unuaĵo, la konkludo estas ĈIO ESTAS UNU.

La ŝunjato estas tiu ĉi UNU. Ĝi ne aperas nek malaperas, ne pliiĝas nek malpliiĝas. Neniu povas distingi ĝian purecon aŭ malpurecon. Ĝi ĉiam fluadas al la ekvilibro kaj pro tio ĝi ekzistas.

Tamen, tiu ĉi kompreno estas ankoraŭ ne sufiĉa. Ĉu ni povas konstati ĝian ekziston REALE? Eble vi opinias ke ni povas konstati viditan objekton per tuŝo, aŭ originon de sono per aŭdo, ĝi do reale ekzistas. Atendu momente, kaj supozu pri sonĝo. Ankaŭ en sonĝo ni povas vidi, aŭdi, tuŝi, kaj gustumi objektojn. Se ni alparolas, respondo revenas.

Ni povas tuŝi viditan objekton. Se ni falas de alta loko, ni sentas foreston de gravito kaj premon de vento, malgraŭ tio ke ni efektive kuŝas sur la lito.

Do, kiamaniere ni povas distingi ekzistaĵon realan de iluzia? Ĉu la ekscito efektive alvenas nin de ekstero, aŭ okazas nur interne?

Ne, ni havas nenian rimedon por konkludi pri tio, dum nia sento, percepto kaj interefikas bonorde. Ĉu ni sonĝas aŭ ne?

Neniu povas respondi tion. Sur tiu ĉi vidpunkto, ni nenion povas scii nek konstati, eĉ nian propran ekzistadon. Homa vivo estus longa longa sonĝo

sen vekigo. Kiam vi rimarkos tion, tiam vi ekkonos ke la mondo havas alian formon kaj koloron, kvankam ĝi estas tute sama kiel antaŭe. Tiam la luminiĝo venos al vi!

Ĝis nun mi menciis pri la ŝunjato tute alude, ĉar la vera signifo de la ŝunjato estas tro eksterordinara por kompreni. Mi esperas, ke vi kaptis proksimuman ideon de la ŝunjato. La vera signifo de la ŝunjato estas jena:

La sola absoluta stato, en kiu ne estas io nek nenio, sed enhavas ĉion nature. Pro tio oni povas atingi la plej altan Versaĝon per la unuiĝo en la ŝunjaton.

Mi supozas, ke vi tute bone komprenos la signifon de la sutro, kaj rimarkos ke ĝi signifas neniam nei ĉion, sed jesi ĉion laŭ la naturo . Per jesado oni povas sinliberigi el ĉia iluzio.

Do, mi deziras ke vi refreŝigos vian koron per la bona komprenado de la sutro, kaj ekmarŝos en la tute liberan vivon.

# Praĵņjaparamita hrjdaja sutro

Ikeda Hiroŝi

Riverenco al Ĉioscianto<sup>1</sup>

Bodisatvo<sup>2</sup> sankta Avalotekiŝvaro<sup>3</sup>, praktikante la profundan praĵņjaparamiton<sup>4</sup>, konstatis ke ĉiun ekzistaĵon konstruas la kvin skandoj<sup>5</sup>.

Plie li penetris ke la skandoj estas tute ŝunjataj<sup>6</sup> laŭnature.

Ŝariputra<sup>7</sup>, en tiu ĉi mondo, ĉia materia fazo<sup>8</sup> estas ŝunjata, kaj la ŝunjata fazo formas materion. La ŝunjato ne ekzistas sendepende de materio, same, la materio ne estas disde la ŝunjato. La naturo de materio estas la ŝunjato, kaj la ŝunjato formas ĉian fenomenon.

Egale ankaŭ sento<sup>9</sup>, percepto<sup>10</sup>, intenco<sup>11</sup>, kaj scio<sup>12</sup> ne havas sian enton.

Ŝariputra, en tiu ĉi mondo, la naturo de ĉiu ekzistaĵo estas la ŝunjato. La ŝunjato neniam aperis nek pereis, neniel puriĝas nek malpuriĝas, neniom pliiĝas nek konsumiĝas.

Tiel, Ŝariputra, ĉe la fazo ŝunjata, nenie troviĝas materio, nek sento, nek percepto, nek intenco, nek scio. Nek okulo, nek orelo, nek nazo, nek lango nek korpo, nek volo.

Formitaĵo videbla, sonoro aŭdebla, odoro flarebla, gusto gustumebbla, objekto palpebla, kaj celo intencebla, ĉio ne ekzistas. De la videbla mondo ĝis la sciebla mondo, neniu ento troviĝas.

Nenie oni trovas trankvilon nek iluzion, sed neniam perdos la trankvilon nek liberiĝos el la iluzio. Fine oni atingas la staton, kie ne estas kadukiĝo nek morto, sed ne liberiĝas el ili. Tie oni ne trovas suferon<sup>13</sup>, suferoriginon<sup>14</sup>, subpremadon<sup>15</sup> kaj subpremvojon<sup>16</sup>. Nenion oni scios, nenion oni gajnos.

Per la sengajneco, oni trankviligas sin, konfidante bodisatvan praĵņjaparamiton, kun la koro ne kovrita. Tiam oni timas nenion, kaj vivas en nirvano<sup>17</sup>, sin liberiginte el renversitaj iluzioj. Budhoj estintaj, estantaj, kaj estontaj atingas la plej superan vastan versaĝon<sup>18</sup> per la praĵņjaparamito.

Do, vi sciu, ke la granda mantro<sup>19</sup> de praĵņjaparamito, la granda versaĝa mantro, la superega mantro, la senkompara mantro subpremas ĉian suferon, kaj ĝi estas eterne vera ĉar malfalsa. La mantro estas jene montrita en la praĵņjaparamito.

gate gate pāragate pārasaṃgate bodhi svāhā<sup>20</sup>.

Jen la fino al la esenco de l' praĵņjaparamito.

## Komentaro

sk.: sanskrite

ĉkj. : ĉine kaj japane

(1) Ĉioscianto: sk. sarvajna / ĉkj. 一切智•全智

La dekkvara nomo el la okdek nomoj de la budho.

(2) "bodisatvo: sk. bodhisattva / ĉkj. 菩薩

Serĉanto de vero en mahajano, kiu penas savi ĉiun el iluzio. La homon kiu klerigas sin en mahajano, oni nomas ankaŭ tiel.

(3) Avalokiteŝvaro: sk. Avalokiteŝvara / ĉkj. 觀自在 aŭ 觀世音.

Nomo de bodisatvo, kiu estas enkorpiĝo de absoluta amo. La vorto estas dividebla kiel Avalokita(observi) + iŝvara(laŭvole). Pro tio oni tradukis la nomon 觀自在 (observi laŭvole). Sed antikve ĝi estis Avalokitasvara, kaj "svara" signifas sonon, pro tio la traduko 觀世音 (observi ĉian voĉon). Ĝenerale la antaŭa estas traduko kun emfazo sur lia saĝo, kaj la posta kun emfazo sur lia amo.

(4) praĵņjaparamito: sk. praĵņā-pāramitā / ĉkj. 般若波羅蜜多

La vorto "praĵņā" (pañņā en Palia lingvo) signifas originan saĝon de homo, kiu rimarkis sian veran mision en homara vivo. Vulgara saĝo kiel juĝkapablo estas nomata "vijņāna". Tamen praĵņā estas la saĝo nejuĝa, per kiu oni penetras naturon de ĉiu fenomeno. Pri la vorto "pāramitā", estas diversaj opinioj. Unu el ili estas: pāram (alia bordo = pura bordo = versaĝo) + ita (atingi), kaj la alia estas: pārami (elatingi la alian bordon) + ta (stato). Ĉi-okaze, praĵņjaparamito kun adjektivo "profunda" ne estas unu el la ses paramitoj, sed enhavas ĉiun paramiton. Ordinare, oni komprenas ĝin ĉi tiel. La ses paramitoj

- (I) *dāna-pāramita* ĉkj. 布施波羅蜜 : Oni donas sian havaĵon al la vivulo kiu malhavas ĝin, ekz. monon al malriĉulo, manĝaĵon al malsatulo, amon kaj darmon al amsekulo. Oni devas fari tion nefiere, kaj neniam esperu ian ajn redonon.
- (II) *śīla-pāramita* ĉkj. 持戒波羅蜜 : Oni devas vivi ĉiam bonkore laŭ justa vojo.
- (III) *kṣānti-pāramita* ĉkj. 忍辱波羅蜜 : Oni devas toleri ĉian suferon, koleri neniam kaj teni nenian plendon aŭ malicon.
- (IV) *vīrya-pāramita* ĉkj. 精進波羅蜜 : Oni devas serĉadi veran saĝon fervore kaj senĉese.
- (V) *dhyāna-pāramita* ĉkj. 禪定波羅蜜 : Oni trankviligas sin, kaj enmetas sin en profundan meditado per koncentrado de sia koro.

(VI) *prajñā-pāramita* ĉkj. 般若波羅蜜

(5) La kvin skandoj : sk. pañca skandha, ĉkj. 五蘊

Tio signifas kvin amasojn aŭ kvin elementojn. Nome, ili estas materio (substanco fenomeno), sento, percepto, intenco kaj scio (enkoraj fenomenoj). Antikvaj hindaj budhistoj havis ideon, ke ĉiu ekzistaĵo estas konstruita de tiuj ĉi elementoj. Ĉar oni povas konstati ion, nur kiam tiuj ĉi elementoj estas tute bonorda.

(6) ŝunjato: sk. śūnyatā / ĉkj. 空

Pri tio mi jam klarigis en antaŭparolo. Mi kredas, ke vi jam komprenis la veran signifon de la ŝunjato. Ĝi neniam signifas la simplan vantaĵon, sed plenplenaĵon kiu povas aperi kiel ĉia fenomeno. Kiam vi vidas komedion en televido, eble vi sentas amuzon, sed se tragedion, vi spektas ĝin kun larmo. Tamen, se vi observas la elektran ondon sur oscilografio, tie vi vidas nur similajn ondojn. Tiuj ĉi similaj ondoj aperas sur la braŭntubo jen kiel komedio, jen kiel tragedio. Ĉiu ekzistaĵo en tiu ĉi mondo estas sama kiel la bildo sur braŭntubo, kaj la radianta brodkastata ondo estas la ŝunjato. Praĵņaparamito estas “vidi oscilografio”, en tiu ĉi ekzemplo. Ni sentas nur iluziajn bildojn, sed ne povas senti la veran ekziston, la elektran ondon, per nia sentorgano. Ni amuzas nin per televidaj teatraĵoj, konstatante ilin kiel iluziajn.

Tute same, ni povas ĝui nian vivon, kiam ni konstatas ke ankaŭ ĝi estas iluzia.

Kiel aktoroj tute serioze ludas sian rolon en la teatraĵo, ni povas vivi tiamaniere, ke ni ludu serioze nian rolon en nia vivo. Tion ĉi signifas praĵņaparamito. La diferenco inter tiu ĉi sutro kaj la ĉapitro Predikanto en Biblio estas en tiu ĉi punkto.

(7) Ŝariputra: sk. Śāriputra / ĉkj. 舍利弗, 舍利子

Unu ella plej altaj disĉiploj de la Budho. Li estis la plej sagaca el la disĉiploj, kaj pro tio aperas en multaj sutroj kiel la demandanto, kiu faras gravan rolon prezenti la doktrinon.

(8) materia fazo: sk. rūpa / ĉkj. 色

Tio signifas substancon aŭ formitaĵon. La vorto estas farita el rūp(formi), kaj signifas formitaĵon, aŭ el rū (rompi), kaj signifas rompaĵon aŭ ŝanĝaĵon.

(9) sento: sk. vedanā / ĉkj. 受

La vorto estas farita el vid (scii), kaj signifas “ricevi eksciton”.

(10) percepto: sk. saṃjñā / ĉkj. 想

La vorto estas farita saṃ (tuto) + jñā (scii), kaj signifas “distingi diversajn aĵojn”.

(11) intenco: sk. saṃskara / ĉkj. 行

Tre malfacila vorto por traduki, ĉar ĝi havas diversajn sencojn en la vorto "kara". La signifo en tiu ĉi okazo estas "formi scion el percepto". Tiu ci traduko estas uzata pro tio ke la vorto havas la sencon jenan "konscia movo fluanta en unu direkto".

Laŭ naturscienca kompreno, ĝi estas kalkulado aŭ komputado en la cerbo por atingi ian konkludon. Ankaŭ aliaj tradukoj, "inklino" aŭ "konscio" estas eblaj.

(12) scio: sk. vijñāna / ĉkj. 識

vi (dividi)+jñā (scii) signifas "scio por distingi". Ĝenerale oni dividas ĝin en ses specojn.

okulo distingas formojn  
orelo distingas sonojn  
nazo distingas odorojn  
lango distingas gustojn  
korpo distingas palpeblaĵojn  
volo distingas objektojn de koro

Tiujn oni nomas ses radikoj.

(13) sufero: sk. duḥkha / ĉkj. 苦

Homa vivo estas plenplena de ĉiaj suferoj. Ni devas konstati tiun ĉi veron.

(14) suferorigino: sk. samudaya / ĉkj. 集

Ĉiu sufero havas sian originon. La originoj amasiĝas kaj konstruas suferon.

Ĝi okazas pro niaj maljustaj deziroj. Ni devas penetri tiun ĉi veron.

(15) subpremado: sk. nirodha / ĉkj. 滅

Por atingi eternan pacon, ni devas subpremi ĉian maljustan deziron.

(16) subpremvojo: sk. mārga / ĉkj. 道

Por subpremi maljustan deziron, ni devas klopodi laŭ justaj vojoj.

De (13) ĝis (16), oni nomas ilin "kvar veroj" kiuj estas la fundamentoj de budhismo.

(17) nirvano: sk. nirvāṇa / ĉkj. 涅槃

Tiu ci vorto signifas staton elliberiĝintan el ĉiaj konfuzitaj iluzioj. Ofte oni komprenas nirvanon kiel trankvilan morton, sed tio estas nur unu okazo de nirvano. En hinajano, nirvano estas fina celo por kleriĝanto, kiu deziras meti sin mem en la trankvilon. Sed en mahajano, ĝi estas la unua etaĝo por savi ĉiun alian en la amon de budhoj.

(18) La plej supera vasta versaĝo: sk. anuttara samyak saṃbodhi / ĉkj. 阿耨多羅三藐三菩提



Tio signifas versaĝon de budhoj. Ni homoj povas senti nur iluziajn fenomenojn.

Nur budhoj povas konstati la naturon de ĉio: kio, kia, kie, kiam, kiom, kial, kaj kiel ĝi estas.

(19) manĉro: sk. mantra / ĉkj. 真言, 咒

Tio signifas “veraj vortoj de La Budho”, kaj havas miraklan forton en la vortoj. Tial oni neniam tradukas ĝin en la sutro.

(20) La signifo de tiu ĉi manĉro estas:

“Atinginto, atinginto, purbordon atinginto, purbordon elatinginto, versaĝo, vivu!”

Aŭ, “Atinginte, atinginte, purbordon atinginte, purbordon elatinginte, versaĝo, vivu!”

Tute laŭsence, “Plenuminte, plenuminte, ion plenuminte, ion perfekte plenuminte, vi tenas versaĝon, vivu!”

(21) esenco: sk. hṛdaya / ĉkj. 心

Ĝenerale tio signifas koron, sed en tiu ĉi okazo, esenco estas pli taŭga traduko.

Estas strange, ke la rilato inter materio kaj la ŝunjato estas klarigita tiel ofte en tiu ĉi mallonga sutro. Estas diversaj opinioj pri tiu ĉi punkto, sed mi supozas, ke eble ĝi estas pruvmaniero en hinda filozofio, t. e.

A troviĝas en B kaj B troviĝas en A.

ne-A ne ekzistas en B kaj ne-B ne ekzistas en A.

tiel A estas B kaj B estas A.